

& La Tagiĝo:

< Ripete 31 sed rekante 15 el 77 batoj por strofo, entute 462 paŝoj dum 6 minutoj. Poemon verkis Antoni Grabowski (1912). Baladigis Martin Strid per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:77> (

So /SoSo So SoSo So SoLa Ti do; Ti LaLa La LaTi do Ti La; So SoSo So SoSo So SoLa Ti do; Ti LaLa La LaTi do Ti La;

(So TiTi Ti TiTi Ti TiLa So Fa; So TiTi Ti TiTi Ti TiLa Ti do;)×

(#Rekantaĵe: So dodo do doTi La So; So SoSo So SoSo So SoLa Ti do o)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 A/gordu la brustojn, ho nia fratar', ;
Por nova, pli vigla jam kanto! ; Ĝi sonu
potence de montoj al mar', ; Anoncu al
ĉiu dormanto:

(; – Tagiĝo, tagiĝo radias en rond', ; La
ombroj de nokto forkuras el mond'!)×

(×:; **Tagiĝo radias en rond', ; La
ombroj de nokto forkuras el mond'!**)

'2 Post longa migrado sur dorna la voj' ;
Minacis nin ondoj de l' maro; Sed
venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj' ; Al
verda haven' de l' homaro.

– Post longa batalo, maldolĉa turment',
; La stela standardo jam flirtas en vent'.
.....

'3 Se venus ankoraŭ ventegoj, batal', ;
Ni estas jam bone harditaj; Esperon ne
venkos la fajro, nek ŝtal', ; Nek ies
perfidoj subitaj.

– Nenio en mondo elŝiros ĝin for, ; Ĝi
havas radikojn profunde en kor'.

'4 Ni velas antaŭen kun kredo, fervor', ;
Benante la Majstron por verko, ; Kaj
lian anaron, de plej frua hor' ; Fidelan
al li, ĝis la ĉerko.

– La mond' aliiĝos, la temp' pasos for, ;
Sed vivos eterne pri ili memor'.

'5 La lingvo benata montriĝis al ni ;
Mirinda donaco ĉiela: ; Per amo al
hejmo, patrujo, naci', ; Ni flamas en
koro fidela.

– Kaj same fidela; al hejma altar', ; Ni
sentas nin filoj de l' tuta homar'.

'6 En ĉiu mondparto, en ĉiu terzon' ; En
koroj de centoj da miloj, ; Jam vibras
por nia saluto reson', ; Do kantas de l'
tero ni filoj:

– Tagiĝo, tagiĝo radias en rond', ; La
ombroj de nokto forkuras el mond'!

)